

Dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperantista.
N° 41 (59) - Aprilo 1982 - Prezo : 3 FF.

ISSN 0150-5823




Eldonata de :

Cercle espérantiste de l'Agenais F 47340 LAROQUE TIMBAUT


Unujara abono : 18 FF (Francio : 15 FF) al jena poŝtkonto:
3 371 74 M Bordeaux (je la ĉi-suprajnomo kaj adreso).

PLI KAJ PLI JUNA
DANK'AL ESPERANTO!



Nia infana paĉo

LA NUBETO
kaj LA STELO



Iam nia nubeto revenis post longa promenado, estis tiel malfrue, ke jam malhelis.

Noktiĝis kaj li malĝojis, tial ke li estis riproĉota de siaj gepatroj. Li des pli malfieris, ke li timis la malhelon, kiam li ekvidis lumon en la malproksimo. Li alproksimiĝis kaj vidis, ke tio estas stelo.

Li opiniis ŝin nebela, tute griza kaj li flanke pasis. Alian vesperon li denove renkontis tiun steleton survoje. "Bonan vesperon!" ŝi diris. Nia nubeto respondis ŝian saluton, sed pluiris.

Jam li trovis ŝin pli bela, ŝi estis tute arĝentita kaj brilis.

Plurajn sinsekvajn tagojn ili renkontis unu la alian. La nubeto pli kaj pli ŝatis tiun etan stelon. Dumtage li pensis pri ŝi.

Ofte, vespere, la nubeto vagadis antaŭ ol rehejmeniĝi, esperante ĝin retrovi. Ankaŭ la eta stelo amis la nubeton. Ŝi trovis lin tre bela kaj poeto: li nomis ŝin "Stela". Ili kune longe promenis en la ĉielo, admirante la lumplenajn paletrojn de la suntavoloj. Kiom da belaj vesperoj ili tiel vivis, unu apud la alia, antaŭ tiom da belaĵoj!

Sed baldaŭ estis vintro. Stela fariĝis pli kaj pli briletanta. La malvarmo briligis ŝin.

Iun frostegan vesperon ŝi vane serĉis sian amikon. Li malaperis super la montaroj.

Sed Stela scias, ke multaj amikoj rigardas ŝin ĉiuvespere, kiam ŝi brilas tie supre!

J.P.Hennebois.



Nia nova debato per ĉen-leteroj :

3

maljuneco kaj esperanto

La enkonduka teksto :

I. Maljuneco ĝenerale

En nia epoko la gemaljunuloj pasigas sian lastan vivperiodon alie ol en la pasinteco pro la transformiĝo de la familia strukturo. En la pasinteco ĉiuj generacioj kunvivis : geavoj ĝis genepoj, aŭ la gefiloj loĝis en proksima regiono. Ja la komuna vivado en komuna hejmo trudis bremsojn en diversaj kampoj. Kompreneble, tiu fakto malebligis al la junaj homoj, precipe al la junaj paroj, vivi laŭ sia plaĉo.

Oni povas kompreni la aspiron de la nuntempaj gejunuloj plenumi tiun deziron; des pli ke la moderna vivo trudas la familian disiĝon. Konsekvence, la maljunuloj travivas la maljunecon en soleco...

Pli bonŝanca estas tiu, kiu vivas en sia dometo ĝis la fino de sia vivo, ol tiu, kiu trapasas tiun periodon en maljunulejo. Tamen, maljunuloj vivas en melankolia etoso, pro la fakto, ke ili ne havas estontecon kaj estas konsiderataj kiel senutilaj en la nuna socio. Tio estas pli sentebla, kiam la gejunuloj foriris el vilaĝoj, kiuj tiel fariĝis gettoj de maljunuloj. Multaj kontentiĝas per televido... Kelkaj helpas al la turisma aŭ sporta afero de la vilaĝo. Aliaj sin dediĉas al siaj artaj emoj. Iuj ŝatas la vojaĝojn.

II. Ĝuste sur tiu lasta kampo Esperanto povas multe alporti al maljunuloj, kiuj krome povas uzi ĝin kiel rimedon por sin kulturi, havi rilatojn kun la ekstera mondo, eksterlandanoj. Tial E povas fariĝi eĉ vivcelo : maljunaj esperantistoj povas uzi sian lastan vivperiodon, konkrete kontribuante al la pliriĉiĝo de la novada vivo, ekzemple per artikoloj en la gazeto, partopreno en la kluba vivo kaj en la kongreskunsidoj.

Tiel Esperanto, donante al maljunuloj okazon havi kreivan okupon, sin dediĉi al alta idealo, flegi amikajn rilatojn, povas esti faktoro de feliĉo por tiu tro flanklasita parto de la socio.

Suzana k Kribo.

La vidpunkto de J.G. :

Laŭ mi, oni devas distingi plurajn maljunecojn :

- La kronologia maljuneco laŭleĝe aŭ laŭkutime komenciĝas kiam finiĝas la tiel nomata "aktiva vivo", reale la "laborista vivo", la kariero, kiel oni diras ! Poste venas la aĝo de emeritiĝo (variebla laŭ la profesioj).
- La mensa maljuneco povas komenciĝi je la dudekjarago ĉe la personoj, kiuj forpuŝas la novajn ideojn, la maltradiciajn sintenojn kaj havas kiel nuran celon daŭrigi la rutinan vivon de siaj antaŭuloj kaj fini sian vivon "riĉaj kaj estimataj" !
- La biologia maljuneco (variebla laŭ la individuoj) : Kelkaj konservas ĝis la fino de siaj longaj vivdaŭroj sian tutan kapablon fizikan kaj mensan. Oni kutimas citi famajn eminentulojn : CHAPLIN, PICASSO, RUSSELL, ktp, kiuj ĝis la fino kapablis verki, generi...sed ĉirkaŭ ni ni povas vidi similajn personojn, aparte ĉe la aktivuloj (vidu en la esperantista estraro !). Bedaŭrinde, la plejparto de la homoj devas suferi la atakojn de la malsano, la malpliigon de la fizikaj aŭ mensaj kapabloj, kelkaj frue, aliaj nur je la lastaj jaroj de la vivo. Same kiel en la aliaj aĝoj de la homa vivo regas la mal-egaleco natura sed ankaŭ tiu trudata de la socio. La homoj, kiuj dum siaj tutaj vivoj estis nur "labormaŝinoj", fariĝas tute malkuraĝigitaj kiam la maŝino haltas ! (Vidu la reagon de la laboristoj, kiuj, pro maldungo, estis devigitaj forlasi la laborejon antaŭ la kutima emeritaĝo. Eĉ se ili konservas la preskaŭ tutan salajron, ili havas la impreson esti nur "sociaj forĵetaĵoj").

Estas vere, ke en nia konkurenca mondo, kiam oni estas nek produktokapabla, nek bela, nek juna, oni povas timi la malakcepton de la ceteruloj. Tie ankaŭ ekzistas rasismo !

Kelkaj privilegiuloj eskapas el la kronologia maljuneco (artistoj, verkistoj, metiistoj, fabrikestroj aŭ ŝtatestroj, ktp). Se la biologia maljuneco ne tro trafas ilin, ne ekzistas rompo. Plu daŭras tio, kio faris la intereson de ilia tuta vivo : ili verkas, regas, faras paroladojn. Vidu la akademianojn, DASSAULT, BREJNEV, ktp...)

La "dudekjaraj maljunuloj" retrovas en la tria-aĝaj kluboj la samajn aktivadojn, kiujn ili praktikis antaŭe : bankedojn, kartludojn kaj ankaŭ ĵaluzajn sintenojn !

Sed por la plimulto maljuneco ofte signifas solecon precipe afekcian. Tiu soleco aspektas malpli granda, se dum la "aktiva" vivo oni preparis la maljunecon per alia aktiveco ol la profesia laboro en libera zorgado kiel esperanto aŭ iu ajn alia, plezuriga aŭ kreiva plenumado. Ja ŝajnas, ke Esperanto estas bona konservilo !

La trapasado de maljunaĝo en propra domo (necesas, ke oni povu aŭtonome plenumi la elementajn gestojn de la biologia vivo) aŭ en maljunulejo laŭ mi dependas de la personoj : kelkaj aspiras al la sekureco en medio de samideanoj kiel en la maljunulejoj de "liberpensuloj" aŭ "vegetaranoj", kiuj ekzistas en Francio. Bedaŭrinde, la maljunulejoj plejofte estas lokoj de vegeta vivo, kie la loĝantoj havas kiel nuran elirejon, la morton.

La maljuneco estas ne nur individua problemo, sed ankaŭ socia problemo.

J.G.

Jacqueline kontribuas :

I. Maljuneco -

Antaŭ nelonge mi havis la okazon konstati, ke unu el la lokoj, kie oni povas sin malembarasi je senila maljunulo, estas psikiatriejo. Tie la maljunuloj estas ligitaj al siaj litoj, kaj la flegistinoj nutras ilin, ŝanĝas la makulitajn littukojn, ktp. Kompreneble tiaj "malsanuloj" ne estas kuraceblaj, kaj ili estas parto de la kutima klientaro de la psikiatriejoj. Tiu emo konfidi siajn familianojn al profesiuloj ekzistas ankaŭ por beboj : nuntempe, la patrinoj laboras, kaj donas siajn infanojn al infanvartejoj, kie deĵoras profesiulinoj. Pli kaj pli oni alvokas al la socio

por taskoj, kiuj antaŭe estis plenumataj de la familio.

Sed mi ne emas kulpigi familion, kiu forlasas maljunul(in)on, se li (aŭ ŝi) estas reale senila. Mi vidis, kia kalvario estis por mia patrino la lastaj jaroj de mia avino : ŝi ne povis lasi ŝin sola eĉ unu minuton, ŝi devis ŝin manĝigi, ŝi devis fari ŝian tualeton, ktp. Kaj mia avino tute ne rekonis sian filinon, insultis ŝin, kaj eĉ provis ŝin bati. Multe suferis mense mia patrino. Kaj mi ne certas, ĉu mia avino suferus, se oni konfidus ŝin al flegistinoj : ŝi ne rekonis la familianojn, kaj ankaŭ ne la domon, ŝi ĉiam volis eskapi por iri "hejmen". En tiu lasta stato, kiam perdita estas la racio, verŝajne la maljunul(in)o ne plu suferas pro la soleco.

Sed mi skribas tie nur pri tiuj, kiuj estas en la lasta stato antaŭ la morto, t.e. perdis ĉian komprenkapablon, kaj pro tio ĉian eblon komuniki kun sia medio. Mi pensas, ke maljunuloj, kiuj ankoraŭ konservas sian racion, devas vivi kune kun aliaj generacioj, anstataŭ esti lokitaj en triaĝaj gettoj. Pli kaj pli tio malfaciliĝas, ĉar la loĝejoj kutime estas konstruitaj por 2 gepatroj + 2 infanoj. Malfacilas trovi en urbo loĝejon sufiĉe grandan por loki infanojn kaj geavojn. Kiam mi estis infano, mi loĝis kun miaj 4 fratoj, la du plej junaj kaj mi estis en la sama ĉambro, la du plej maljunaj estis kune en alia ĉambro, kaj la tria ĉambro estis okupata de la gepatroj. Pli grandaj loĝejoj estas maloftaj, kaj kostas multon. Tial la resto de la geavoj kun la genepoj ekzistas nur sur la kamparo : mia patrino zorgis pri mia avino post la emeritiĝo de mia patro kaj la reveno de la familio al la parenca regiono. Se oni volas, ke geavoj restu kun la familio, do necesas alie plani la konstruadon de loĝejoj en urboj. Jam estas problemo por familio, kiu havas pli ol du infanojn, ĉefe se ĝi estas laborista, aŭ enmigrinta.

Alia eblo estas krei lokojn, kie renkontiĝas la generacioj, t.e., anstataŭ havi klubojn por la tria aĝo, havi klubojn, kie infanoj, plenkreskuloj kaj maljunuloj partoprenu kune en aktivadoj. Tiaj devus esti la Esperanto-kluboj.

II. Maljunuloj en la Esperanto-medio -

Kiel mi jam skribis en alia ĉenletero, la Esperanto-klubo de Strasburgo similas klubon de la tria aĝo. Mi pensas, ke tiel estas en aliaj E-kluboj. Tio estas tre bedaŭrenda. Estas paradokse ke, venkante la landlimojn per Esperanto, oni tamen ne venkas la limojn inter la generacioj.

Fakte, kiel multaj aliaj libertempaj aktivadoj, la E-medio konsistas el :

- maljunuloj, kiuj estas la plimulto
- junuloj, kiuj estas la malplimulto.

Ofte okazas konfliktoj de generacioj inter tiuj du komponantoj. Mankas la meza generacio. Junulo havas tempon, kaj freŝan menson por lerni Esperanton. Sed poste, kiam li laboras, li jam havas malpli da tempo. Poste venas la edziĝo, kaj oni ne plu povas eliri pro la neceso zorgi pri la infanoj. Tiam perdiĝas la junaj esperantistoj. Kelkfoje, kurso por maljunuloj rekaptas eks-lernanton, kiu miras, ke Esperanto plu ekzistas, ĉar iam, en sia juneco, antaŭ longa tempo, ktp..

Do tasko por la E-movado devus esti zorgi pri la partopreno de la meza generacio, t.e. de homoj, kiuj havas profesiajn respondecojn, familiojn, ktp. Jam ekkonsciis pri tiu problemo la Germana Esperanto-Junularo, kiu organizas ĉiujare ambaŭ renkontiĝon por gejunuloj kaj renkontiĝon por "mezaĝuloj", t.e. esperantistoj inter 25 kaj 60 jaroj.

Estas esperende, ke nia medio sukcesos realigi harmonion inter la generacioj, ĉar mi pensas, ke maljunaj esperantistoj ne ŝatas resti inter si, kaj preferus vivi en kontakto kun diversaj homoj.

Jacqueline.

Jean-Claude opinias jene :

La moderna vivo trudas aŭ ebligas familian disiĝon, eĉ sur la kamparo. Kial ebligas ? Ĉar tiu disiĝo preventas eventualajn konfliktojn de generacioj. Telefono kaj veturilo ebligas al ĉiu generacio vivi laŭ la propraj ritmo kaj devigoj sen rompi la rilatojn.

Ĉu pli bonŝanca estas tiu, kiu vivas en sia dometo, ol tiu en maljunulejo ? Ne devige. Tio dependas de ĉies karaktero kaj situacio. Mi renkontis personojn kontentajn vivi en geav-ejo.

Kiel ajn estu, eminentulo aŭ balaisto sukcesas sian maljunaĝon, kiu donas celon al sia vivo. Povas esti, daŭrigante la profesion aŭ ne. Ĉefas, ke li (ŝi)alportu ĝojon ĉirkaŭ si, sin sentu tuta membro de sia vivmedio.

Por tio, ĉu krei klubojn, kie renkontiĝus la tri generacioj? La ideo ŝajnas al mi bona. Sed ne anstataŭ la jam ekzistantaj. Ĉar ĉiu aĝo havas propran personecon, do bezonas apartan lokon. Fakte estas kiel en familio, kie krom la necesaj komunaj ĉambroj, ĉiu bezonas personan ejon por sin izoli.

Pri la konsisto de la kluboj, tiel longe dum Esperanto estos rigardata kiel afabla libertempaĵo kaj ne kiel ilo necesa, mi timas, ke la E-rondoj similos geavajn klubojn. Tamen eĉ tiu situacio povas utili, ĉar same kiel ekzistas plum-onkloj, multjarulo povus fariĝi plumav(in)o, kaj samtempe flegi kontaktojn kun eksterlandaj samaĝuloj. Sed tio plene efikos, nur se, kiel dirite, la persono partoprenos en la loka vivo. Ĉar por kio utilas nekomunikebla sperto? Ĝi mortas.

Eble opinios iu, ke Esperanto ne utilas al aĝul(in)o. Povas esti, sed ĉu vi scias, kiu estas la temo de la venonta U.K. en Antverpeno? "Generaciaj aspektoj de la Esperanto-movado", kun inter aliaj demandoj ĉi tiu: "Ĉu la movado rilatas en ĝusta maniero al siaj pli aĝaj membroj, utiligante iliajn apartajn kvalifikojn por antaŭenigi la lingvon internacian?"

Kaj ankaŭ tiu anonco legita en la lasta "Heroldo": "Yvette VIERNE (5 rue Dr Roux, F 34000 Montpellier) falis kaj rompis sian femuron. Ŝi estos en malsanulejoj malproksimaj de ŝia ŭrbo dum 4-6 monatoj. Kun plezuro ŝi ricevos amiksignojn: la poŝtaĵoj sekvos ŝin."

Esperanto senutila!? Pri tio demandu ŝin, mi petas.

Jean-Claude.

Pliaj kontribuoj pri tiu temo aperos en la venonta numero. Dume, kaj kvazaŭ por ilustraci nian debaton, jen nova artikol-serio de nia amiko VALO...

Li parolas al ni unue pri kulturo:

Vortoj de maljunulo



En mia tempo...

Tiel komenciĝas ofte la paroloj de maljunuloj. En ilia tempo, t.e. dum ilia infaneco kaj juneco, la ĉielo estis pli blua, la suno pli brila, la floroj pli bonodoraj, la virinoj pli belaj. Ĉu ne ankaŭ mi cedos al tiu manio?

Hodiaŭ mi parolu pri kulturo. Laŭmoda temo. Ĉu vi amas la kulturon? Oni metas da ĝi en ĉion. Bone. Sed kian kulturon?

Ni ĝin ricevas abunde pere de la "mass media". Ĝi estas verŝata kvazaŭ tra funelo, en formo de kapturita sinsekvo de bildoj kaj sonoj. Sub tiu lavango ni superŝutite ne plu reagas, ĉion sorbas senkritike kaj, plej grave, senpripense.

Mi esceptos kelkajn altnivelajn muzikajn dissendojn radiajn aŭ televidajn. Sed kio pri plastikaj artoj? Krom, ankaŭ ĉi tie, iuj honorindaj esceptoj, kiujn mi volonte salutas, oni prezentas al ni galopan sekvencon da pentraĵoj aŭ skulptaĵoj, sur kiuj nia rigardo ne povas momenteton halti. Kiu trovas tempon por viziti muzeon, longe kontempli unu artan verkon, sin penetrigi per ĝia belo aŭ ĝia mesaĝo? Kion vi diras? Ke almenaŭ turistoj vizitas muzeojn? Vidu ilin kurantajn post urĝema gvidisto, kiu monotone debitas sian stereotipan monologon.

Ĉu temas pri literaturo? Jen venas helpe la hejma ekrano. Prezantisto kunvenigas kelkajn aŭtorojn, kiuj parolas pri siaj lastaj verkoj kaj sin reciproke kungratulas. Ni ĉion scios pri la formo de ilia nazo kaj la koloro de iliaj haroj, pri la sono de ilia voĉo, eĉ pri iliaj opinioj kaj intencoj. Ni vidos la koverton de iliaj libroj... Poste, kiom el ni malfermos unu el tiuj volumoj?

Novan escepton mi konsentas pri teatraĵoj, ĉu komediaj ĉu lirikaj. Same kiel pri la koncertoj, mi rekonas, ke en

mia tempo estis pli malfacile, precipe ekster grandaj urboj, spekti altvalorajn prezentajn. Sed oni ankaŭ prezentas en formo de filmo grandajn verkojn de pura literaturo, kreitajn por legado, ne por rigardado. Mi ne volas misparoli pri kino : ĝi estas ja vera, valida arto. Sed Balzac, Hugo, Dickens, Zola, Tolstoj ne verkis por kino. Nu, post kiam ni spektis la filmon aŭ filmoserion "Milito kaj Paco", kiom el ni kuraĝas legi la majstran romanon de Tolstoj ? Ne nur proletoj, sed ankaŭ bonstataj "intelektuloj", krom esceptoj, tre malmulte aŭ tute ne legas.

En mia tempo, t.e. en la unuaj jaroj de la XX-a jarcento, mi konis plurajn laboristojn urbajn, vilaĝajn aŭ kampajn, kiuj legis "la Mizerulojn", kiuj legis verkojn de Zola, de Gorki, astronomi-vulgarigajn librojn de Camille Flammarion, geografiajn priskribojn de Elisée Reclus, natursciencajn rakontojn de J.H.Fabre. Ili parkerumis poemojn de V. Hugo, de Casimir Delavigne, de André Chénier. Unu el miaj onkloj, kravatvendiŝto en pariza granda magazeno, ŝparis el sia magra salajro por aĉeti malkaran kromseĝan sidlokon en koncerthalo aŭ en la Operdomo. Longe poste li parolis al mi, kun revalumo en la okuloj, pri la "Krepusko de l'Dioj" aŭ pri la "Sanktigo de l'Printempo" de Stravinski, kies unuan prezenton li ĉeestis en 1913. Mi konis laboristojn, kiuj post longaj lacigaj labortagoj regule ĉeestis kunvenojn ĉe Popoluniversitatoj. Tie prelegis aŭ debatis Sébastien Faure, Han Ryner, pastro Viollet, doktorino Pelletier, Jean Charcot kaj multaj aliaj. La spektantoj senpere vidis kaj aŭdis la oratorojn, kiel ni nun vidas kaj aŭdas ilin sur la ekranoj, kaj ili mem faris demandojn kaj partoprenis en la debatoj.

Ĉu ni rajtas pretendi, ke ni estas pli kulturitaj ol tiuj simplaj laboristoj de mia tempo ? Aŭ ĉu ni diros, ke tiu tempo estis pli "kultura" ol la nuna ? Nu, ne tro rapide : la demando ne estas tiel simpla...

Valo.

(daŭrigo en la venonta n-ro)



La
P A C O - L I B R O
de
Bernard BENSON

La mondo travivas fascinegan kaj angoregan epokon. La ideologiaj, religiaj kaj kulturaj limoj transformiĝas pro premado de ampleksega intermiksado, kiu jam komencas alpreni novan formon malgraŭ multaj malfacilaĵoj.

Ĉiun tagon miloj da homoj mortas pro malsato... Konfliktoj eksplodas, militoj disvolviĝas... Ni jam kapablas forpereiĝi nin mem eĉ plurfoje ; kune ni ĉiuj financis detrupotencan ekvivalentan kiel du milionoj da Hiroŝima-bomboj. El la pli ol 80 000 nukleaj eksplodiloj stokitaj ĉiu loĝanto de nia planedo unuope estas minacata de 7 tunoj da T.N.T.-ekvivalento !

Bernard BENSON, verkisto de la "PACO-LIBRO" (Fayard-eldonejo), batalas por la Paco de post 1961. La Paco-libro rakontas la historion de infano, kiu iras por renkontiĝi kun Prezidentoj dispartantaj la termonuklean armilon, kaj kiu sukcesas ilin konvinki pri absoluta senelireco de la vojo, laŭ kiu ni nun antaŭeniras.

Bernard BENSON bone scias pri tio, kion li traktadas. Fizikisto havanta tutmondan reputacion, li inventis la unuan kontroleblan misilon. Pioniro pri informatiko kaj spertulo pri armilaro, li konfide eksciis pri ĉiuj nukleaj ŝtatsekretoj. Ekkonsciente pri monstreco de la militmaŝino, li tuj decidis ĉion forlasi por de tiam dediĉi sian energion al la Paco.

La Internacia Asocio por la Paco-Libro, patronita de Sean MAC BRIDE (Nobel-premiito pri Paco), Alfred KASTLER (Nobel-premiito pri fiziko) kaj

Lord BAKER (Nobel-premiito pri paco), efektive igas multajn projektojn ofte inspiritajn el la Paco-Libro.

Ĉiutage centoj da simpatiantoj decidas konkrete agadi. Bernard BENSON konstante precizigas, ke la 4 miliardoj kaj 415 milionoj da homoj vivantaj sur nia terglobo havas la eblecon diri NE! al la 200 personoj, kiuj estas tuj alprenontaj neinvertigiblan decidon.

Se vi firme deziras Pacon, se vi opinias, ke la paco estas realigebla, ke ĝi signifas nek "demision" nek "malkuraĝon", kaj se vi decideme pretas agadi favore al ĝi, tiam vi certe povas ian ajn taskon tiucele entrepreni, kaj devas ĝin elplenumi.

BENSON mem starigis limtempon je 100 semajnfinoj por finplenumi sian agoplanon. Jen la tuja projekto por tuta Francio-teritorio:

- la 16an de marto 1982, ĉe la Lernejoj kaj Universitatoj, disdonado de resuma teksto pri konceptoj kaj celoj de la "Paco-Libro".
- Tiam ni proponas sugestojn:
 - a) sendi tiun mesaĝon al la regionaj kaj landaj respondeculoj, ankaŭ al alilandaj gekorespondantoj kaj geamikoj.
 - b) kunorganizigi cele al kunlaborado kun la Centra Asocio en Parizo, kiu havigos adresojn de alilandanoj kun teksto altradukita en ilian propran lingvon por plusendado: tiel ili havos la eblecon siavice daŭrigi la procezon.
- Tiamaniere vigle disvolviĝos "Paco-dinamiko" ĝis la 6a de aŭgusto 1982, ekde kiam ni esperas efektive la scenaron de la Paco-Libro, aparte per infandelegracioj, kiuj vizitos ŝtatestrojn.

Necesas volontuloj por konsistigi grupojn pretajn realigi tiun planon. Se vi sentas emon al partoprenado, ekkontaktu:

A.I.L.P. 163 rue du Chevaleret
F 75013 PARIS Tel: 584 74 20

E-VIVO

A R D E Ŝ O

En PRIVAS okazis, de la 23a ĝis la 29a de novembro 1981, ekspozicio "Le livre Esperanto"; demonstracio de la RIKAMetodo (metodo de persona kulturo PER esperanto) en la Klubo de emeritaj instruistoj la 2an de februaro 1982. Tiuj multe ridis same kiel, en la grupetoj, la trejniĝantaj partoprenantoj ("Rikantoj").

Bedaŭrinde ne estas E-grupo en la urbo. "VIVARA STELO", en la departemento, dormetas de multaj jaroj. Ĝi baldaŭ vekigu! Paŭlineto.

T U L U Z O

La Laborista E-Grupo de Tuluzo (nun tre reduktita) kunvenas ĉiun duan kaj kvaran merkredon de la monato je la 21a horo en la CNT-sidejo, 3 rue Merly, en TULUZO.

A Ĝ E N I O

Dek ĉeestantoj en CLAIRAC la 28an de februaro. Ĉar nia grupo konsistas el maksimume 16 personoj kiam belas la vetero, kaj kvankam ni decidis pri nenio grandioza, ni ĉiuj estis tre feliĉaj pro tiu kvazaŭ "ĝenerala" asembleo de AERA. Plu funkcias kursoj en Villeneuve (3 personoj) kaj Monflanquin (kvar geknaboj + 1 plenkreskulo). Ni fiksas la daton de la venonta grupkunveno:

Sabato, 15an de majo, ĉe la stacidomo de LAROQUE TIMBAUT, je 14 H 30.

En junio (dato diskonigota en venonta "Laŭte!") okazos la kongreso de la franca sekcio de IPTEA (poŝtista E-asocio). Iuj el ni intencas ĝin ĉeesti kiel observantoj aŭ membroj (du membroj de AERA estas gepoŝtistoj), tial ke ĝi okazos en AGEN.

LANGVEDOKO-RUSILJONO

Dimanĉon 9an de majo 1982 okazos en PERPIGNAN la jara federacia kongreso de la regiono "Langvedoko-Rusiljono".

Por la fruaj alvenontoj jam sabate estos organizita akceptado ekde la 15a h. ĉe la Kultura Centro, 72 av. du Général-de-Gaulle kaj je la 21a, interkona vespero, 2 strato St Mathieu.

Oficiala programo :

Dim. 9an de majo : 9H30 - Malfermo de la kongreso ĉe Centre Culturel Catalan, 2 str. St Mathieu, fronte al la preĝejo St Mathieu. 12H30 - Komuna tagmanĝo, 15 strato Ste Catherine (prezo : 45 FF, sen trinkaĵo). 15H - Vizito al la CASA PAIRAL (apud la kongresejo) monumento Castillet, Muzeo de la Katalunaj Artoj kaj Tradicioj.

Bv. konatigi vian partoprenon antaŭ la 30a de aprilo al: Kultura Esperantista Centro, 72 av.Général-de-Gaulle, F 66000 PERPIGNAN.

Por la bona organizo de la tagmanĝo kaj okaze de rezervado ĉe la hotelo : tel. 16 (68) 34-22-18.

Niaj Katalunaj samideanoj de la regiono Girona kaj Barcelona partoprenos nian renkontiĝon kaj parolos pri sia agado.

V I V O DE "LA ŬTE" kaj de "LA ŬTULOJ"

Meze de marto estis registritaj 280 abonoj, dum estas pli ol 30 "forĝesoj" reaboni kaj ĉ. 20 normale renovigotaj dumjare. Ĉiujare, estas inter la "forĝesintoj" kelkaj personoj, kiuj reabonas nur post admonado, kutimo, kiu vere ne faciligas la laboron de la "administranto" kaj fakte dubigas pri la interesiĝo de tiuj personoj al "Laŭte!"...

Ni petas : Abonu nek pro "kompato" nek pro trudo... nur se vi opinias, ke la bulteno estas interesa por vi.

Kiel aboni ? - Se vi loĝas en lando, kie eblas sendi poŝtĝirojn al Francio, prefere ĝiru mem rekte al nia pĉk. Tio ŝparigas tempon kaj poŝtajn taksojn. Se vi loĝas en t.n. nepagipovaj landoj : vi povas kompensi per filateli-aĵoj aŭ E-literaturaj libroj,...ankaŭ per int.respondkuponoj, sed tiu rimedo estas profitdona nur al la poŝta sistemo !

Notu la novan peranton en Aŭstralio : K-do Vlado KOSEF, 58 Green St., COBAR, N.S.W. 2835, kun kiu ekrilatu la tieaj interesatoj - kaj la eblecon aboni en Britio pere de la Libroservo de SATEB, 74 Saxon Road, HASTINGS, East Sussex, TN35 5HH.

Fine, dankon al ĉiuj, kiuj subtenas la bultenon per donacoj, aŭ pagante abono(j)n por konatoj aŭ nekonatoj !

la Laroka laŭtulo, Kribo.

M. DUC-GONINAZ :

KIEL ONI INSTRUAS LINGVOJN

(Kelkaj konsiloj al la kursgvidantoj)

Resumo de la prelego farita de S-ro DUC-GONINAZ, la 26-6-1967 ĉe "Comité des Loisirs", Parizo.

ATENTIGO - Tiuj ĉi konsiloj, verkitaj en 1967 laŭ peto de Parizaj gekamaradoj, ne celas al originaleco. Ili celas nur sciigi bonvolemajn kursgvidantojn pri la principoj de la lingvoinstruado ĝenerale aplikataj en francaj lernejoj. La spertoj de niaj kursgvidantoj de Esperanto povos naski interesan debaton.

Enkondukaj rimarkoj

KONDIĈOJ DE LA KURSO

- Plej ofte tiuj kondiĉoj ne dependas de la kursgvidanto, eĉ ne ĉiam de la organizanto. Tamen, kiam eblas :
- Estas necese distingi inter "pedagogio" (instruo al infanoj) kaj instruo al plenkreskuloj ; plej ofte la maniero devas esti diferenca. Pro tio oni evitu miksi la infanojn kun la plenkreskuloj.
 - Estas preferinde, se la klaso estas homogena, ne nur laŭ la aĝo, sed ankaŭ laŭ la intelekta nivelo, eĉ laŭ la socia situacio kaj la gepatra lingvo.
 - La nombro de lernantoj ne devas esti tro granda (25 estas maksimumo), 10 aŭ 15 estas la ideala nombro. (La danĝero ne estas tre granda en Esperantokursoj, tamen se, en la komenco, la lernantoj estas tro multnombraj, oni devas zorgi por ilin dispartigi inter du kursoj).
 - Estas utile koni la motivadon : Kial la homoj venas al Esperanto ? (Estas preferinde scii tion en la komenco de la kurso).

LA KURSGVIDANTO

Li devas esti kompetenta (bonvolemo ne sufiĉas). Eĉ por gvidi elementan kurson li devas bone posedi la lingvon, tio signifas ke :

- li/ŝi devas havi sufiĉan konon de la gramatiko,
- li/ŝi devas bone elparoli la lingvon ; bona prononcado pli gravas ol perfekta kono de gramatiko (ĉefe ĉe la komenco, ĉar la lernanto aŭdas Esperanton de unu nura persono dum sufiĉe longa tempo) ;
- li/ŝi devas persone labori kaj perfektigi.

LA METODO

Ne ekzistas unu nura bona metodo. (La plej bona estas tiu, kiun kapablas apliki la kursgvidanto).

LA LABORO DE LA LERNANTO

La persona laboro de la lernanto estas grava ; ĝenerale la kurso okazas je la ritmo de unu fojo ĉiusemajne : estas ege malmulte.

- Pro tio la kursgvidanto devas doni la klarigojn kaj la ekzemplojn dum la kurso, sed poste, ĉiutage la lernanto devas fari ekzercojn dum dek minutoj. La kursgvidanto donu do laboron por fari hejme.
- Estas ofte erara opinio en la menso de la lernanto : li kredas, ke la laboro de la instruisto sufiĉas. Male, la lernanto devas lerni ne pasive, li ne devas nur aŭskulti, sed aktive labori.

Bazaj pedagogiaj principoj

- Kiel dirite, oni do memoru, ke la kursgvidanto bone scipovu la lingvon kaj perfektigu. Li/ŝi devas :
- Paroli klare (ĉar tion oni konsilas ankaŭ al la lernantoj : paroli forte, kuraĝe kaj elegante).
 - Uzi la nigran tabulon, skribante kiel eble plej klare kaj plej bele (oni devas instrui la skribadon, ĉefe ĉe la komenco, ĉar ekzistas fremdaj elementoj : la supersignitaj literoj).
 - Kontrolu senĉese la komprenon kaj por tio fari multajn demandojn ; la lernantoj devas elparoli, ripeti kaj

mem fari frazojn (inkluzive demandajn, ĉar tro ofte la lernanto faras nur respondojn).

- Klarigi la elementajn gramatikajn principojn (ĉefe la nociojn pli ol la terminojn).
- Fari diktaĵojn por kontroli la lernadon de la alfabeto (oni ne kredu, ke la lernantoj skribos korekte post la ellerno de tiu alfabeto ; cetere oni ne lernigu ĝin tro rapide).
- Flegi la intereson (Pri tio vidu supre : deveno de la lernantoj).

Plej ofte en la komenco de la kursoj oni diras nur banalaĵojn. Por eviti nur "fari bruon per la buŝo" oni devas rapide trovi sufiĉe interesajn temojn. Oni parolu pri vojaĝoj, aktualaĵojn (kiel eble plej rapide, por ke la lernantoj ne laciĝu).

Eraroj evitendaj

Oni devas :

- Ne legi sklave la lernolibron, sed nur utiligi ĝin.
- Eviti miksi la lernatan lingvon kun la nacia. (Se oni utiligas metodon, kiu estas ne plene en la instruata lingvo, oni uzu :
 - * nur Esperanton en unu parto (konversacio)
 - * nur la nacian lingvon en alia parto (gramatikaj klarigoj)
- Ne monologi.
- Ne doni tro da novaj vortoj (oni kutime konsilas en la instruado de fremda lingvo doni dekon da novaj vortoj en unu leciono ; eble oni povas doni iom pli en Esperanto : maksimume 15 aŭ 20).
- Ne uzi gramatikajn formojn, kiujn oni ne klarigas en la sama leciono.
- Ne fabriki tute artifikajn frazojn, kiuj utiligas ne kutimajn formojn (pretekstante pli bonan komprenon aŭ pli grandan logikecon).
- Plej ofte uzi lernolibron (la kursgvidanto ne estas devigata forĝi mem sian kurson). La lernolibro ebligas al la lernanto labori hejme.

**

Kiel oni instruas fremdajn lingvojn

en la lernejoj ?

Pri la metodo estas utile konsulti la oficialajn instrukciojn. Tiuj instrukcioj oficialigas la rektan metodon (1950). Sed tiu metodo estas fakte uzata jam de duonjarcento.

PRINCIPOJ DE LA REKTA METODO :

- Paroli kaj, poste, legi kaj skribi korekte.
- Ekzercigi la lernantojn al praktiko de la lingvo.
- Interesigi la lernantojn al la kutimoj de la popoloj, kies lingvon ili lernas.

SKEMO DE LEKIONO (kiu ne devas esti tre rigora)

10 mn - Demandado pri la antaŭa leciono. (sen libro)

- * Laŭeble demandi al ĉiu lernanto,
- * fari la demandon antaŭ ol nomi la demandoton,
- * ĉe la komenco - sed nur ĉe la komenco - kutimigi la lernantojn al konstruo de respondoj, eĉ artifikaj (ekz. : "Ne, tio ne estas elefanto, tio estas tablo."),
- * agi tiel ĝis la atingo de respondoj pli simplaj, ĉefe pri akuzativo (ekz. al la demando : "Kiun vi renkontis ?", la respondo "La leterportiston" estas tre bona, ĉar en flua lingvo la ripeto de la verbo en la respondo ne necesas).

30 mn - a) Studado de novaj vortoj (plej malfacila parto de la leciono) (sen libro)

- * Oni lernu la vortojn, kiujn oni trovos poste en la libro (se eblas per monstro de objektoj),
- * oni povas skribi ilin,
- * en la komenco tiu faro estas relative facila, sed poste pli kaj pli malfacila : estas necese utiligi la novajn vortojn en ĉirkaŭteksto, kiun la lernanto facile komprenas.

b) Kontrolo pri la asimilado de tiuj novaj vortoj. (sen libro)

La lernantoj devas pruvi, ke ili komprenis la sencon. La plej bona maniero estas uzi ilin en frazo alia ol tiu farita de la instruanto.

c) Lego de la teksto fare de la instruanto. (li, sed nur li, malfermas la libron)

La lernantoj aŭskultas la tekston (temas pri teksto farita el frazoj).

ĉ) Kontrolo pri la kompreno de la teksto

En la komenco oni faras demandojn, kiuj devigas la ripetadon de la frazoj; sed poste, kiam la lernantoj fariĝas pli lertaj, oni povas fari demandojn pri la senco kaj eĉ peti personajn opiniojn pri la teksto.

d) Ekzerco pri legado (la lernanto malfermas la libron)

Tiu ekzerco estas necesa por montri, ke oni komprenis la tekston.

e) Traduko de la teksto (se tio estas necesa)

TIAM OKAZAS LA UNUA UZO DE LA NACIA LINGVO.

20 mn - Gramatika lernado

Farita en franca lingvo, rilate al la frazoj studitaj. Oni provu akiri la klarigojn de la lernantoj mem.

Gramatikaj ekzercoj

Estas bone fari unu en la klaso kaj doni unu simplan por fari hejme.

UZO DE LA KAJEROJ

- Oni notigu sur la kajerojn la novajn vortojn (sen francaj vortoj).

Ĉar la celo estas : pensi en la nova lingvo, oni devas strebadi al tiu celo.

Se poste la lernanto dubas pri la senco de iu vorto, li povas kontroli en la vortaro.

- Oni notigu ankaŭ frazojn, en kiuj la novaj vortoj estas entenataj.
- Se necese, oni skribigu al la lernantoj la gramatikajn regulojn (en franca lingvo, sed ĉe la fino de la leciono).
- Notigu sur la kajerojn ankaŭ la taskojn farotajn en la hejmo.

MALAVANTAĜO DE LA REKTA METODO

La kompreno ne estas ĉiam certigita, ĉefe kiam temas pri abstraktaĵoj. Por helpi al la kompreno, la instruisto devas peni por prezenti la novajn vortojn : li devas tre ofte aktori, eĉ klaŭni.

ELEKTO DE LA LIBRO :

La instruisto unue elektu sian metodon, posteli elektos la lernolibron.

Oni ne forgesu ankaŭ, ke la lernolibro devas taŭgi por la publiko.

Problemoj propraj al instruado de Esperanto

- Oni ja povas en Esperanto fari la gramatikajn klarigojn antaŭ la komenco de la leciono.
- Se la lernantoj havas sufiĉajn gramatikajn bazojn, oni devas doni al ili sufiĉan gramatikan materialon, kondiĉe ke oni utiligu ĝin tuj.

Ekzemple :

- * Oni lernigu tuj la verbajn tempojn : as, is, os kun hodiaŭ, hieraaŭ, morgaŭ.
- * Oni instruu ata, ita simple kaj rapide (legata/legita...)
- * Oni lernigu tre rapide la demandajn vortojn : ĉu, kiu kia,... per ofta ripetado. (Oni tuj apartigu la vorton "ĉu" de la aliaj per la rimarkoj : "Al ĉu oni respondas per "jes" aŭ "ne").
- * Oni devas enkonduki tre frue certajn bazajn principojn, eĉ se ili aspektas strangaj al franclingvanoj.
Ekzemple : "Veturi per motorciklo estas danĝere"
(Eble eĉ en la unua leciono oni faru tion).
Oni enkonduku la akuzativon kiel eble plej frue.
- * Oni ne kredigu, ke la lingvo estas tre facila.
- * Sed ankaŭ oni ne subtaksu la kapablon de la lernantoj por kompreni la strukturon de la lingvo.

* *
*

Bibliografio

Utilas legi :

- * "Clefs pour les langues vivantes" par Jean GUENOT (Seghers, éd.)
- * "Novaj tendencoj en la instruado de Esperanto" de Andrzej PETTIN (Eld. Pola Esp-o Asocio, 1965)
- * "Metodologio de Esperanto" de Istvan SZERDAHELYI (eld. Budapeŝta Universitato, 1980)
- * "Lerneja instruado de la Internacia Lingvo", de I. SZERDAHELYI (n-ro 1 de Internacia Pedagogia Revuo)
- * "Metodiko de la Esperanto-instruado", de Rudolf RAKUŜA, 1970.

Lernolibroj plej taŭgaj por publikaj kursoj :

Por junaj infanoj :

"Esperanto por infanoj" de G. GLADSTONE SOLOMON (Eld. Esperanto Publishing Co, 1961).

Por lernejoj kaj kursoj por junuloj :

"Junulkurso", de SAT-Amikaro. (Rekta metodo).

Por la publiko de la vesperaj kursoj :

"Initiation théorique et pratique à la langue internationale Esperanto", de Pol DEMOËL.
(Gramatika metodo tre klara por popola publiko).



 ** La 70-a datreveno de la kibuca movado **

La 8-an de oktobro 1980 kolektiĝis en la valo de Jordano, proksime de la lago Tiberiado, festantaro nombranta 17 mil homojn, por solene rememori la fondon de la unua kibuco, Deganja, kaj de la tuta kibuca movado. Festparolis la ŝtats- prezidento, la sekretario de la Histadrut (unuiĝo de la laborsindikatoj), reprezentanto de la centra kibuca movado kaj veterana membrino de la gastiganta kibuco. Kadre de impone grandioza subĉiela prezentado, estis surscenigita fone de la restaŭrita etaĝa loĝbarako kaj mastruma ilaro, siatempaj dancoj, kantoj kaj kostumoj, teatraĵo pri la vivo de la pioniroj en la jaroj antaŭantaj la unuan mondmiliton. Ĉirkaŭe etendiĝis la ebenaĵo, piede de montaroj Golan kaj Gilad, la tipa bunta pejzaĝo de la citrus- kaj bananplantejoj kaj daktilboskoj. Sube, profunde, serpentumis la akvostrio de la rivero, respegulanta la lumbrilon en la varmeta, fruaŭtuna vespero.

Ĝuste 70 jarojn antaŭe, en 1910, metis sian plandon ĉi tie grupo de dek du gejunuloj, venintaj kelkajn jarojn antaŭe al Israellando el sia naskiĝlando, la cara Rusio. Ili loksidiĝis sur terpeco akirita de la Juda Nacia Fonduso. Ili ne estis spertaj pri terkulturo, des malpli pri estrado de kolektiva farmo. Ili ne estis geniuloj, nek superhomoj; kompanse, en ilia sino ardis entuziasme firma konyinko pri la celo atingenda: fondo de nova societo, en kies fundamento kuŝas plena egaleco de ĉiuj ĝiaj membroj, societo sen ekspluatantoj kaj ekspluatatoj: ĉiu kontribuu laŭ sia kapablo kaj ricevu laŭ siaj bezonoj.

La vojo de la pioniroj ne estis pavimita per rozoj; multajn malfacilaĵojn ili devis alfronti: la varman subtropikan klimaton, la fortelĉerpan, por ili tute nekutiman terlaboron, la primitivajn vivkondiĉojn, la malarion kaj la mortigan "flavan febron". Ĉirkaŭe vagadis inside atakemaj, duonsovaĝaj beduenoj; la korupta otomana reĝimo ne povis aŭ ne volis garantii la vivsekuron de siaj civitanoj. Baldaŭ falis la unua viktimo per manoj de embuska murdisto. Tamen, spite al la mornaj antaŭdiroj kaj avertoj de skeptikemaj eksteruloj, la eta grupo

ne malesperiĝis, ne forlasis la celitan vojon. Ilia nombro daŭre kreskis per novaj aliĝoj ; aperis ankaŭ la unuaj infanoj, inter ili la poste famiĝinta Moŝe Dajan, armeestro kaj ministro.

Al la junaj membroj de la kibuco aligis sin la elstara pensulo kaj ideologo, la jam neĵuna Aharon David Gordon. Lia nomo jam disfamiĝis tiam en la lando ; pere de siaj artikoloj kaj publikaj paroladoj li akiris grandan reputacion kaj influon en laboristaj rondoj. "Ni revenis en antikvan landon de niaj prauloj, por liberigi nin de la katenoj de la Diasporo, por konstrui al ni novan vivmanieron konforme al nia nacia kulturo, tradicioj, lingvo kaj aspiroj" - diradis Gordon. Sed tio ĉi per si mem ankoraŭ ne sufiĉas. Necesas nepre funde ŝanĝi nian vivkoncepton. La juda popolo versence liberiĝos kaj resaniĝos, se ĝi demetos ankaŭ la anomaliojn kaŭzitajn de la dumiljara ekziliteco. Ĝi devas aliigi sian socian strukturon per amasa reveno al produktiva, t.e. fizika laboro kaj unuavice : terkulturo. La lando apartenos efektive al ni, se ni propramane prilaboros la teron.

Gordon ne kontentiĝis per skriba kaj buŝa pledado kaj disvastigado de siaj ideoj. Li mem, malgraŭ sia alta aĝo, vivtenis sin per korpaj laboroj, migrante de loko al loko, ĝis li alvenis al Deganja. La verkistan laboron li faris en la ripozaj horoj, rifuzante akcepti iun ajn privilegion.

La ekzemplo de la pioniroj el Deganja inspiris multajn aliajn. Ĉar unuflanke la terrezervo de la kibuco estis limigita, kaj aliflanke, laŭ la tiama koncepto, la nombro de la apartenantoj al certa kolektiva grupo ne devis superi kelkajn dekojn da homoj, pluraj aliaj kibucoj fondiĝis dise en la lando, de la libana landlimo ĝis la Ruĝa Maro. Hodiaŭ ilia nombro atingis 258, kun 110 miloj da loĝantoj.

En majo 1948 Deganja estis atakita de la siria armeo. Tio okazis sekve de la deklaro de la sendependeco de la Juda Ŝtato. La invadintaj arabaj armeoj celis atingi, ke nia unua libera tago estu ankaŭ la lasta. Per kanonoj, tankoj, aviadiloj ili semis morton kaj ruinojn. Sed la defendantoj de Deganja kaj la batalantoj de Hagana ne kaptulacis ; per preskaŭ nudaj manoj atakis la kirasajn monstrojn. Fine post plurtaga luktado la malamiko ĉesigis la

sieĝon kaj retiriĝis, je prezo de grandaj perdoj por si.

Danke al la heroeco de la defendintoj de Deganja, saviĝis de pereco la tuta regiono. Apud la orienta barilo de Deganja videblas ĝis nun forbruligita siria tanko.

Hodiaŭ Deganja apartenas al la plej evoluintaj kibucoj. Ĉirkaŭ ĝi ariĝas 15 kolektivaj mastrumoj : la Valo de Jordano kaj Tiberiado fariĝis iasence "respubliko de kibucoj". D. havas loĝantaron de pli ol 500 personoj. Plaĉaspektaj etaĝaj domoj etendiĝas meze de vastaj herbejoj, ombraj aleoj, ornamarboj kaj arbustoj. Kiel en la plimulto de la kibucoj, fondiĝis ankaŭ tie industria entrepreno. Ankaŭ ĝi, kiel la agrokulturo, belege prosperas, dank'al la modernaj metodoj enkondukitaj, kaj ne lastvico dank'al la alta moralo kaj sindediĉo de la kibucanoj.

La memoron de la flamanima oldulo eternigas la "Domo Gordon", Muzeo de Naturo, Agrokulturo kaj historio de la Jordana Valo. Ĝi enhavas ankaŭ bibliotekon de ĉirkaŭ 50 mil faklibroj diverslingvaj, inter ili la verkaro de Gordon kaj vasta literaturo traktanta lian ideologion. El la fondintoj de Deganja neniu plu vivas. Iliaj geidoj kaj dekmiloj da kibucanoj dise en la lando daŭrigas sian pacan batalon por ĉiutaga efektivigo de la principoj por libera, justa socio, en spirito de la plej altgrada humanismo kaj homamo. La ekzemplodona vivo de Gordon kaj liaj kunuloj ŝvebas antaŭ iliaj okuloj, montranta la vojon kiel lumanta torĉo.

Cvi Löwenkopf (Kibuco Maagan)

El letero de la verkinto :

"Sub instigo de mia korespondantino f-ino G.G. el Bordojo, kiu vizitis ĉe mi antaŭ kelkaj monatoj, mi sendas por publikigo en LAŬTE mian artikolon aperintan en aprilo 81 en ISRAELA ESPERANTISTO ; kredeble la legantaro interesiĝos pri la temo, des pli, ke ĝi venas el aŭtenta fonto. Mi nome vivas ĉi tie, en la Valo de Jordano jam de preskaŭ 40 jaroj (depost aŭgusto 1942) kiel membro de kibuco Maagan, situanta 3 km. sudoriente de Deganja. Mi laboras kiel bibliotekisto en la "Domo Gordon" menciita en la lasta alineo de mia artikolo. Pretere, mi estas, laŭ mia scio, la unusola aktiva e-isto en la tuta regiono..."

* *
* *

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

Tempo ĉiam fluas ja nerezisteble,
Spite ĉion ekzistantan, nevenkeble,
Mem farante kaj kreante la Naturon,
Montoj, arboj, bestoj signas lian spuron.

Antaŭ li polveras la generacioj,
Neniigas la jarmiloj, la nacioj...

Detruanto refaranta ĉion nova,
Nur li estas la Kreanto ĉiopova.

Universoj, sunsistemoj en li sparkas
Kaj senfine en mallumo putre sterkas.

Estas li de materio la rajdanto,
La eterna militanto kaj venkanto,

Kiu venkas sen batali, per la Lumo,
Fugigante la mallumojn, kvazaŭ fumo.

Komenciĝon kaj finiĝon ĉiu Ciklo
En li trovas. Li mem estas la Vehiklo

Ĉies ekzistadoj, vivoj kaj agadoj,
La komenco kaj la fino ĉies padoj.

Nur li estas l'Eternulo, la Vivanta
Antaŭ kiu Homo estas nulo vanta,

Kies kultoj kaj oferoj senutilas,
Kaj balaste nur sterile plej futilas.

Saŭmero sur la ondoj de l'jarmiloj
Kiel estus de li homoj la gefiloj?

Krom bonvole plenumante sian rolon,
Kaj humile elportante lian volon?

Tempo, Spaco kaj magneta la influo

Jen la Triunuo fonto de Vivfluo,

Kiu trudas nek kultadon, nek oferojn,

Kaj bezonas nek milititojn, nek konkerojn.

Jen l'Unika vera Dio senmistera,

Kies Homo estas nur vehiklo pera. (°)

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

(°)Mezokosmo inter

En Eymet 1982/01/01.

Makrokosmo kaj

Mikrokosmo.

B.G.D

^^^^^^^^^^^^^^ La supersigna problemo ^^^^^^^^^^^^^^^

Ho, kiom da inko oni jam elverŝis pro ĉi tiu afero de diakritaj signoj de Esperanto ! Nu, tiu afero havas plurajn dimensiojn : socia, lingvistika, presa, komputila, estetika k.a.

Ĉar la latina lingvo ne havis ekz. la ŝuŝan s (ŝ), la naciaj lingvoj plej diversmaniere formis ĝin :

la germana per sch

la franca per ch

la angla per sh

la pola per sz

la sveda per sj

la ĉeĥa per ŝ

la hungara per s

La ĉeĥan manieron adoptis pluraj lingvoj : la litova, latva, estona, finna k.a. La rusa lingvo, kiu estis tre familiara al la iniciatinto de Esperanto, formas la ŝ-literon per III , do per nedigramo. La principo - unu sono, unu litero - kiun Zamenhof utiligis en sia lingvo, estas centprocente bona, eĉ se ĝi fakte uziĝas nur 99%-e. Ĝi plene konformas al la morfologio de la lingvo.

En la Fundamenta gramatiko estas noto, ke okaze de manko de supersignaj litertipoj oni povas uzi sh, gh...u. Ekz. ĉe la telegrafio tio bone uziĝas : shi achetis chevalon. Tamen kelkaj asertas, ke gh kaj jh aspektas fremde kaj strange. Kial ? Ĉu ili tiom alkiutimiĝis nur al siaj propraj literaroj ? "Shi" aspektas familiare kaj bone, dum "ghi" aspektas neakceptinde. Vere kurioze, sed el la objektiva vidpunkto ili estas same bonaj aŭ malbonaj, belaj aŭ malbelaj. Kaj oni memoru ke duono de la homaro havas nelatinan alfabeton : ĉina, japana, korea, araba, rusa, greke, devanagara...

Laŭ mia kompreno, la fundamenta alfabeto kun supersignoj bone adaptiĝis al la moderna prestekniko, sendepende ĉu temas pri linotipa, lumteknika, komputila aŭ lasera kompostado, kun kelkaj problemetoj : multaj komputiloj akceptas ĉe siaj periferieroj nur la latinan alfabeton, tiuokaze oni uzu la h-sistemon, kiu ja ŝanĝas la alfabetan ordon, sed ĉu tio fakte

malutilas ? Diversaj listigoj okazas en alia alfabeto ordo ol en PIV, sed tio fakte neniom malutilas. La moderna komputila terminalo, ĉe kiu mi de tempo al tempo laboras en mia laborloko, akceptas jam äöü kaj å kaj montras ilin sur la ekrano kaj presas (printas) ilin. Finfine iam oni povus programigi la komputilojn uzi ankaŭ niajn supersignojn. La modernaj "printiloj" estas termikaj aŭ laseraj.

Esperanto havu sian propran fizionomion, tradician kaj absolute validan. Tio estas de esenca valoro rilate la estontecon kaj kontinuo de nia movado.

Mi kredas, ke la parolon en Esperanto oni povos iam sintezi rekte en la tekston. Ĉar la klareco de la esperantaj fonemoj kaj la kristaleco de la esperanta gramatiko estas evidentaj, tio certe estos atingebla multe pli facile ol ĉe la naciaj lingvoj, precipe ĉe la angla, kies ĉiufanka malklareco tion longege malhelpas. Esperanto havos brilan estontecon, se ni eŭropanoj ankoraŭ kelkan tempon eltenos kontraŭ la ĉiopoveco de la angla, ĝis la azianoj vekigos kaj surprenos la aferon. Ĝis tiu tempo ni eltenu kuraĝe, heroe, firme. Jam la tempo maturiĝas, ekzistas certaj simptomoj.

S. P. Hurttä Finnlando.

Maljunulo rakontas :

La aŭtodidakto

Dum miaj meti-vojaĝoj en mia juneco, kliento riĉa kaj influa, tre kontenta pro mia laboro, min komplezis, donante al mi senpagan biletan al koncerto, kiu gastis en tiu ĉi loko. Li diris al mi : "Iru vidi kaj aŭskulti ĉi tiujn multajn homojn, ĉiujn strabiĝintajn!!!"

Mi respondis : "Ĉiujn...strabiĝintajn? Kiu al vi diris ĉi tion ?". Lia respondo : "Ne povas esti alie, ĉar per unu okulo ili devas vidi estron kaj per la alia okulo tion, kion ili devas sonigi..."

Per tiu respondo mi lernis, ke oni povas fariĝi riĉa kaj influa per memlernado...

-nn-

Rimarkigoj

Neniu kulpas, naskiĝinte en ia medio. Neniu kulpas pro siaj heredaj genoj.

Do, kiu pasive ĉion eltenas, tiu ne kulpas pro tia emo, same tiu, kies koro vibras pro maljusteco, subpremo, ĉiu ajn perforto.

La pasivaj homoj, kies pasivecon oni nutras lerte per misinformado, volonte ignoras - aŭ pli ofte nescias - la glavon de Damoklo, kaj strute fermas la okulojn antaŭ la danĝeraj faktoj. Tamen tiaj danĝeroj estas realaĵoj kaj jam efikas(is). Multaj malbonŝancaj homoj spertis tion : atomcentralaj akcidentoj, ĥemiaj akcidentoj (Seveso), nukleaj kaj ĥemiaj armiloj. Malgraŭ tio, en radiofoniaj dissendoj iuj aplombe neas tion ; laŭ ili, neniu mortinto ĝis nun !!! Sed tiaj aĉaĵoj inside efikas ; ne ĉiuj trafitoj tuj mortas. Pro tio la pasivemaj homoj trankviliĝas. Bedaŭrinde, tiaj homoj transformas balotadon en senelirejon. Kaj ankaŭ bremsas la pliboniĝon de la homsocio. Ili trudas al la klarvidantaj homoj sian sorton. Ofte inter ili estas homoj, kies profesio estas inter la plej agrablaj ; ili plene ĝuas siajn favorajn vivkondiĉojn kaj nenian intereson havas pri la malfeliĉa sorto de la plimulto, kaj kompreneble ne helpas ilin por ĝin transformi.

Mi memoras rimarkigon de onklo al sia nevino : "Ci havas hundan agmanieron, nur la nutro sufiĉas al ci". Antaŭe, la onklo atentigis ĝin pri la aĉa homsocio kaj la nevino jene respondis : "Ni ne estas malfeliĉaj".

Pri Larzako, Golfech, temas pri bataloj, do ĝis la fino de la batalo oni pritraktu tiujn okazantaĵojn. Tiuj, kies koro ne vibras pri tiuj ĉi aĉaj trudadoj, opinias tiujn temojn tedaj ; sed tiuj, kiuj strebas al pli humana homsocio, provas dissemi siajn sciojn, esperante, ke ie semo renkontos konvenan teron por ĝermi, ĉar foje, ĉu pro sia medio, ĉu pro malfacileco, iuj ne havis la okazon ekscii pri tiaj temoj filozofie traktataj.

La homoj (la teduloj), kiuj provas vekigi la konsciencon de la nesciantoj (ĉefe koncernataj), ne sin juĝas kiel kleraj, - almenaŭ pri mi - , ili nur konigas la altajn sentojn, kiujn ili havis la ŝancon koni, celante esti utilaj al la ceteraj. Ĉiel, eĉ se kleraj, ili ne estas memkontentaj pro tio, tiu

sinteno ne kongruus kun iliaj filozofiaj sentoj, idealo. Ĝenerale, ili ne estas orgojlaj, tiu "virto" ne konvenas al ili. Ili estas sinceraj homoj, al kiuj tia strebado ofte havigas malagrablajn.

Iu uzis la banalaĵon "bona konscienco". Tiu esprimo, ofte aŭdata, estas senpripense dirita. Bona konscienco = trankviligita konscienco. Ĝi koncernas homojn, kiuj nur donas monon por iuj suferantoj. (Foje, por igi ilin larĝe malfermi sian monujon, oni organizas faman monduman dis-traĵon, ekzemple : Balo de l'Blankaj Litetoj !! Kaj tuj poste ili forgesas tion kaj egoiste vivas. Male, la "teduloj", kvankam ili estas gajemaj homoj, havas ĉe la koro malgajecon, kiu mildigas iom sian ĝojon. De longe ili scias, ho ve!, ke ilia strebado reliefigi la danĝerojn ne trovas multajn atentajn orelojn. Tio havigas al ili konstantan amarecon, tamen ili daŭrigas la strebadon, esperante, ke iam lumo naskiĝos. La afero estas tiel grava por la posteuloj, kies sorto ne estas enviinda.

El la kontribuo de nia amiko B.G.D. (n°40) : "La homoj preferas krei al si problemojn ol solvi kaj malaperigi ilin. Sen problemoj ili ne kapablu elporti sian vivon". La tagaj informoj pravigas tion. Fakte ili temas ĉefe pri militoj, vetarmado per pli kaj pli mortigaj armiloj, kies efikeco estas pli kaj pli aĉe elpensata. Tio ne estas naturaj fenomenoj, sed faroj de homoj pro monprofita avido... Ĉu la homa vivo postulas tiujn frenezaĵojn ?! Post la dua mondmilito plurfoje mi aŭdis : "Por solvi la ekonomian krizon, eksplodu milito!!". Mi demandis min, ĉu homo inda je tiu nomo povas diri tian abomenaĵon ! Verŝajne tiu ne havis familianon, kiu estis en la frontaj tranĉeoj dum la unua mondmilito, aŭ diversmaniere suferis, eĉ mortis, dum la dua ! Se ankoraŭ ni ne suferis trian militon, estas nur pro la timo de la mondregantoj ne eskapi el la konsekvencoj. Mi timas, ke iam ilia avido superos ilian timon.

Mia patro, kiu estis en la frontaj tranĉeoj kaj elstudis la aferon, konvinkiĝis, ke tia buĉado, kiu tiel grandkvante mortigis homojn, estis zorge planita : Kiam la popolo konscias pri sia ekspluatado, oni senkapigas la ribelon. Ĉiam la samo okazis en la pasinteco : Ĉiuj mondregantoj sin interhelpis kaj plu interhelpas.

Pri Larzako : Ĝi estis lukto de oponentoj al eksproprieto. Pratece kunligiĝis la homoj, kiuj ariĝis sur la altebenaĵo Larzako, venante el diversaj landoj. Ni esperantistoj emocie ĝoju pri tia fakto. Zamenhof kreis sian lingvon por tiu celo!

Pri mizogineco : Bedaŭrinde, ĝi estas realaĵo ! Eĉ se iuj virinoj ne konscias pri tio, tamen ili suferas ĝin. Kiel oni povis legi en "Laŭte!", homoj en la pasinteco jam konsciis pri ĝi, inter ili koraj viroj. Nun multaj verkistinoj traktas (is) la problemon, elstudis ĝin. Fakte, ili estas kleruloj ; Ĉar ili estas tiaj, ili helpu la ceterajn !

Humure, gaje vivi, ĉiu individuo ŝatus tion. Sed la nuna homsocio ne permesas tion. La "teduloj" strebas ĝuste al gaja vivo por ĉiu !

Pri iu ajn temo oni elstudu la aferon antaŭ ol kritiki, ekz. pri la ekologiistoj. Tiam oni serioze argumentos. Antaŭ la dua mondmilito ni ne uzis kandelojn por lumigi la lokojn, nek loĝis en arboj aŭ roktruoj. Mi havis elektran fornon, kaj ni hejtis nian domon per centra hejtado. Mi precizigas, ke ni ne estis riĉuloj, tio signifas, ke relative multnombraj homoj en mia vilaĝo ĝuis la ĉi-suprajn oportunaĵojn. Telefono, lifto ne estis tiel ĝenerale uzataj kiel nun, tamen ili estis. Pri la televido, unu el la postmilitaj eltrovaĵoj, ne necesas atomcentraloj. Inter la du militoj mi iris ĉe dentkuraciston kaj mi zorge atentis pri miaj dentoj, do mi ne suferis dentdoloron nek ĝis nun (70-jara) mi havas artefaritan dentaron.

Ĉu estas eble cinike ironii pri la libertempoj de la ekologiistoj ? Ĝenerale, kiam oni libertempas, ne estas por ricevi batojn, esti aĉe vundita fare de noblaj kuraĝuloj. Mi ĵus relegis raporton pri la malnoblaj okazintaĵoj en Golfech la 29/11/82. Ili similas tiujn, kiuj okazas ĉie en la mondo, kaj kiujn, laŭ oportuneco, la mondregantoj konigas, eĉ emfaze, aŭ tutsimple ignoras kaj kaŝas al la popolo. Fakte, pri la aĉaj faktoj en Golfech Amnestio Internacia redaktas dosieron, kaj oni rilatas kun Ligo de Homrajtoj . La luktantoj estas pacaj homoj kaj nenian profiton ili havas. Do, senprofita agado. Krom se ili venkos : la sano, kiu estas plej valora posedaĵo.

Estus facile de nun ŝpari energion grandkvante. Mi ne listigos ĉiujn farindajn (farendajn) ŝparojn. Ekzemple, mi mencias tion : oni kolektas la vitrobotelojn, celante reuzi

la vitron. Oni ilin disrompas. Ĉu ne estus pli racie, uzi la botelojn antaŭ ol ili estos rompitaĵoj? Samo okazas pri kartonaĵoj, ktp.

Mi ne opinias, ke ĉiam la "progreso" liberigas la homojn de tedaj laboroj pro utiligo fare de monprofitantoj, kiuj postulas de la laboristo grandkvante produkti. Eĉ en la teksa industrio, kiu ne estis inter la plej penigaj, la perfektigitaj teksmaŝinoj ege lacigas la laboristojn, kiuj ofte malsaniĝas. Ni ne parolos pri la uzataj ĥemiaj produktoj, artefaritaj fibroj. Pli bone estus forlasi la nutro-industrion kaj nutri nature la bestojn kaj kulturi la plantojn.

Kial esti tiom multnombraj? Ĉu ne estus pli racie esti pli malmultaj, kaj ke ĉiuj egale ĝuu la vivon?

Sur la pesilo, ĉu la pesiltaso de la sano ne estu pli peza ol la pesiltaso de la postulataj elspezoj pri sunkaj vent-energioj? Kio estas pli valora al la homo, ĉu la sano aŭ ĉu la mono?

Oni ege ŝparus monon kaj energion, produktante longedaŭrajn aparatojn. Ekzemple, mi havas elektran fornon de tridek-unu jaroj.

Tiel agante oni ŝparus penon al la homoj, ili, se laboristoj, povas iom ĝui la vivon. Nun multaj ne ĝuas longan emeritecon...

Kompreneble, "Dudek Jaroj" de K. VIAVANT plaĉas al ni, pacifistoj!

Suzana.

HISTORIO DE S.A.T. (1953-1981)

Tio estas daŭrigo de samtitola verko pri la vivo de la Asocio de 1921 ĝis 1952: celoj kaj praktikaj manifestiĝoj de la movado. En ĝi estas prezentitaj: la kongresoj, la evoluo de la junulfako kaj de "La Juna Penso", de la geknaba gazeto, la eldonado de gazetoj kaj revuoj, de "Sennaciulo" en kiu libere esprimiĝas la plej diversaj opinioj, de "Sennacieca Revuo", de P.I.V., de diversaj libroj, de la riĉenhava broŝurservo, la kursoj, la diversaj fakoj kaj frakcioj de S.A.T. (sennacieca vojaĝservo, magnetofonservo, filatelio, eksteraj rilatoj, kontaktoj, Amnestio Internacia...)

G. Roux.

35 paĝoj, 4 FF ĉe Cercle espérantiste de l'Agenais

INTERNACIA EKSPOZICIO PRI INFANPENTRAĴOJ *****

Ĉe la Popol-Domo (Maison pour Tous) en CENON (Ĝirondio) baldaŭ okazos sufiĉe grava kultura evento en rekta rilato kun Esperanto: Internacia Ekspozicio pri infanaj belartaj verkaĵoj organizata de la Popoldoma Esperanto-fako.

Per anoncetoj kaj ĉefe per personaj kontaktoj, dank'al Esperanto, jam promesplene ariĝis sufiĉe multnombra kaj altnivela materialo. De nun la organizantoj rajtas garantii ampleksan prezentadon de infanverkaĵoj el pli ol dudek landoj, inter kiuj kelkaj ege malproksimaj, kiel ekz. Aŭstralio, Islando, Ruando, Brazilio...

Inaŭguro-ceremonio okazos lundon la 3an de majo, fine de posttagmezo. Poste la ekspozicio estos malfermata al la publiko ĉiutage dum posttagmezo de la 14a ĝis la 19a h., escepte de dimanĉo la 9a ĝis sabato la 15a de majo inkluzive. Senpaga estos la vizito (rimarkinde, ĉu? en nia epoko!).

Tiu kultura aranĝo kompreneble servos ankaŭ por diskonigo de nia Universala Lingvo: propagandbudo tiucele staros en taŭga loko ĉe la ekspozicio-salono mem.

Ĉiujn geesperantistojn de la regiono, eĉ de pli malproksime, la organizantoj kore invitas laŭeble ĝin viziti; ne nur pro plezuro ilin bonvenigi, sed ĉefe pro trafa propagando publike elmontri praktikan uzadon de Esperanto. Krome, kiuj havos eblon partopreni en la inaŭgura ceremonio, tiuj de nun rezervu la daton sur sia notlibreto por nepre ĉeesto.

Oni certe jam divenis, ke la lokaj geesperantistoj penas plenumadi tian pezan taskon ne nur pro ties kultura aspekto - kvankam ĝi ne estas neglektebla - sed ankaŭ, kaj ĉefe, ĉar ĝi rolas, kiel alloga preteksto por propagando favore al Esperanto.

La respondeculo pri la Popoldoma Esperanto-fako

Léo ROBERT.

Plu disponeblaj... jenaj libroj eldonitaj en Japanio:

La tundra ĝemas (Eroŝenko): 20 FF

Lumo kaj ombro (Eroŝenko): 20 FF

Malvasta kaŝo (Eroŝenko): 25 FF

Sarkasme kaj entuziasme (Miyamoto): 37,50 FF

Skiza historio de la utao (Miyamoto): 25 FF

Studoj pri la esperanta literaturo (Benczik): 37,50 FF

Mendu ilin pere de "Laŭte!". La afranko estas inkluzivita.

TRA LA MONDO
per biciklo kaj esperanto

BEPOU, la 18an de oktobro 1930

En Beppou ni estas sur la japana lazura marbordo. Mi ricevis kortuŝan akcepton de Sinjoro ASAO, eminenta regiona kuracisto, amiko de familio KUDA. Li vizitigas al mi la lokajn termofontojn : blankvaporajn gejzerojn, bolantan koton, en kiu oni povus kuiri ovojn.

Sinjoro ASAO kiel kuracisto prezentis min al siaj kolegoj. Oni montris al mi la policinstruejon. Mi ĉeestis la trejnadon de la rekrutoj venintaj el la kamparo. Konvene rembunitaj, armitaj per kanbastonegoj, ili sovaĝe batalis kontraŭ du viglaj kaj spertaj monitoroj. Oni substrekas, ke tiu metodo respondas al policanaraj bezonoj, kaj mi komprenas, kial la japano estas tiel subtila kaj malfacile venkebla batalanto en la civitaj aŭ eksterlandaj militoj.

La 23an de oktobro 1930 mi denove estas en urbeto KOKURA meze de laborista distrikto. Ĉie estas nur fabrikoj kaj la esperantistoj estas ĉiuj laboristoj aŭ oficistoj. Mi parolas esperanton en esperantista lando ; mi estas en ESPERIO kaj la urbo JAHATA estas komparebla kun SAINT-ETIENNE aŭ ROUBAIX laŭ industria kaj proleta vidpunkto. En la plurajn kilometrojn longa urbo ĉio estas fume nigra. Ĉi tie ĉiu alveninto el Sovetio estas suspekta, tial la policanaro ĉiam diskrete ĉeestas. Mi estas plurfoje fotita de pasiaj amatoroj.

La 28an de oktobro, vizito de anatomia muzeo, sub gvidado de 30-jara profesoro. Mi vidas senmankajn vicojn da organoj pli-malpli atakitaj de malsanoj. Estas terure. Oni sin demandas, kiel povas pluvivi personoj portantaj tiajn mizerojn. Kvankam interesata, mi sentas naŭzon. Post la muzeo mia amiko kondukas min al la zoologia ĝardeno de la laboratorio kaj fine al la nekropsiejo. En tiu funebreca ĉambro, malgraŭ pureco kaj rigora desinfektado, ŝvebas kadavra kaj medikamenta haladzoj. Mi angoras. Feliĉe, mia gvidanto, kiu eble min observis, tie finas la viziton. Mi preskaŭ estis svenanta.

Mi pretigas mian foriron el Japanio.

Mi estas en Japanio de tri monatoj. Kiom da impresoj, memoroj, amikecoj momentaj aŭ daŭraj mi ricevis en tiu lando ! Kiaj ekzemploj pri humileco, civitismo kaj persistemo donis al mi ĝiaj landanoj ! Nun mi sentas aspiron forlasi tiun landon pro la venanta vintro. Ĉiuj insiste konsilas, ke mi ne iru al Ĉinio. La tiea situacio estas tre malbona. La lando estas meze de anarkio. Sed firma estis mia decido trairi Ĉinion de ŜANGHAJ al Hindoĉinio tra Kantono per propraj rimedoj : mia biciklo, mapoj kaj volo.

La 8an de novembro 1930 mi enŝipiĝas en NAGASAKI, akompanate de granda multego. La adiaŭoj estas kortuŝaj ; mi ĝislarme emociiĝas. Adiaŭ, mirinda Japanio, adiaŭ, karaj amikoj miaj, adiaŭ tero gastama kaj milda ! Mi volus, ke tio estu nur ĝisrevido, kaj tamen 37 jarojn poste mi ne plu esperas plenumi tiun belan revon.

Post trankvila vojaĝo la ŝipo alvenas antaŭ ŜANGHAJ. Pluvas. La pejzaĝo estas aflikta : verdas nur kelkaj kampoj. Ĉe la mizeraj kabanoj de la antaŭurbo pendas plurkoloraj ĉifonoj. Kia malĝojo !

Baldaŭ mi estas ĉekaje. Meze de la tumulto flirtas verda standardeto : mi estas atendata. Diskrete mi respondas al tiu signo. Tiel estas farita kontakto kun miaj novaj amikoj.

* *
* *

Ĵinrikŝo rapide kaj lerte veturigas min ĝis la franca konsulejo, meze de infera trafiko. Kiel en Ĥarbino, la konsula sekretario forte malkonsilas, ke mi entreprenu 4 - 5000-kilometran vojaĝon en lando sena je vojoj kaj tumulto.

Ŝanhajo, sabaton 8an de novembro 1930

Daŭras la malbela vetero, kiel en Francio samsezono. Ĉe la franca katolika liceo AURORE, S-ro SERVONI kaj mi estas tre afable akceptitaj. Novan fojon mi prezentas la celon de mia vizito. "Tre danĝere, nefareble" estis al mi klarigite per gazetoj kaj mapoj. La pastro diras al mi ankaŭ pri la persekutoj, elaçetmonaj postuloj, kiujn suferas la misiistoj. Konsekvence endas cirkuli sen mono kaj sen armilo, kion mi jam faras. Tria kondiĉo : absoluta neŭtraleco kaj respekto al la homoj kaj ties moroj, metodo, kiu ĉiam sukcesis al mi.

Kvara kondiĉo : rigora sendependeco al ĉiuj, krom mia natura subteno : la esperantistoj.

Tiu bona pastro reliefigas, ke la danĝero fontas el la "defalaĵoj" de ambaŭ armeoj naciista kaj komunista. Antaŭ ol min forlasi li aldonas, ke se mi persistos en mia projekto, mi estos bone akceptata en ĉiu franca katolika misio. Hodiaŭ, la 13an de novembro, datreveno de la morto de la populara doktoro SUN JAT SEN ; ĝi estas oficiala festotago kaj nur kelkaj metiistoj daŭrigas sian laboron.

Du tagojn poste ni veturas al la vilaĝo de Sinjoro PAN DI SŌ. Kiel veturilon mi uzas "sio-sio"n, la faman ĉinan ĉarumon. Sur la kamparo, multaj kanaloj. Por labori, neniu tirbesto, neniu maŝino, nur arkaika ilaro. Ĉie regas mizero.

Ĉu elmontro de ksenofobio aŭ nura ŝerco ?

Ofte mi haltas por lasi pasi la haŭlistojn. Ŝajne ili miras vidi min tie kun mia biciklo. Ĉiufoje ili flanken saltas por min eviti. Poste, kiam finiĝis la surprizo, ili ridas kaj krias mokaĵojn, kies gestadon mi almenaŭ komprenas.

Iam mi decidas foti iujn el tiuj kontraŭkutimaj scenoj. Por tion fari, mi forgesas momente la biciklon malantaŭ mi. Subite la fotata ŝipanaro ekridas, insultas min. Mi returne rigardas. La biciklo ne plu estas tie. Senbrue, alia teamo de haŭlistoj estis ĝin ĵetinta en la kanalon. Mi vidas la stirilon iom elakviĝantan. Nur la pezo de la ekipaĵo malhelpis, ke mia maŝino plongus en la mezon de la kanalo. Tamen tio estos unu el la maloftaj manifestacioj samspecaj dum mia tuta restado en Ĉinio. Sed kial tia sinteno ? Kiel en Francio, la ŝipanoj ĝenerale estis honestaj sed krudaj, same kiel la laboro, kiun ili faris.

(daŭrigota)

Alfa-Beta.

*
* La venonta numero aperos fine de aprilo. Ĝi entenos *
* la daŭrigon de la debato "Maljuneco kaj esperanto", *
* pliajn kontribuojn pri "Kiel instrui esperanton", *
* recenzojn kaj la kutimajn rubrikojn, laŭ ĉies emo. *
*
